



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantisjo, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

1986 - 3

(JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



« Orfeo irinta Inferon » (2-a parto)...



Kaj la stranga muzeo de Robert TATIN

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKĈIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	I
Esperanto tra la Mondo (Frangoul)	2
La stranga muzeo de R. Tatin	3-4
Orfeo (II) (R. Watier)	5
Valentin Haüy (S. Boniol)	6-8
Niaj poetoj	9
Paĝo de la geknaboj (K.Pasleg')	10
Fantaziaĵoj: A. Ĉekov	11
Por via distro (C. Cavalié)	12
La Vie de Gresillon	13-14

El Gresillon

Jam la 29-an de junio estis fiksita la kalendaro de la diversaj partoj de la programo por 1987. La enhavo de ĉiu el tiuj partoj ankoraŭ ne estas finpreta. Venontan novembron estos presita pli detala programo. Sed, jam nun, rezervu datojn por ĉeesti unu el la proponitaj staĝoj.

Diversaj demandoj ofte faritaj al ni montras, ke la Esperanto-Domo, ĝia statuto, ĝiaj celoj ne estas bone konataj. Unue, pro ĝia neŭtraleco, ĝi estas malfermita al ĉiuj esperanto-organizoj. Ĝi akceptas unuopulojn, familiojn, grupojn. La celo de la Kooperativa Asocio, kiu posedas la bienon estas proponi al Esp-Asocioj, francaj aŭ ne-francaj, akceptadon kaj helpon por la organizo de staĝoj, renkontoj, seminarioj. Sed, ĉar la Asocioj, francaj kaj ne-francaj, ŝajne ne scias, ke ekzistas tia ebleco por ili, la Esp-Domo de longe mem organizas siajn proprajn programojn kiuj nun fariĝis fame konataj. Pro tio la Esp-Domo proponas kursojn por diversnaciaj ek-lernantoj, progresigajn kursojn kaj interesajn prelegojn

al la lertuloj. En la diversaj salonoj kaj klas-ĉambroj povas kunveni de dek ĝis cent personoj. La libro-servo estas ampleksa kaj la biblioteko riĉa. La parko ebligas agrablajn promenadojn kaj la ĉirkaŭaĵo interesajn ekskursojn. Sportojn oni povas praktiki sur la bieno (naĝadon, manpilkon, tablo-tenison) aŭ en la urbeto. Sed kompreneble nur vizito povas doni al vi ĉiujn respondojn.

La kalendaro de la kulturaj aranĝoj por 1987 estos la jena:

Aprilo (19/25): Internacia Renkonto de Infanoj.

Junio (14/30): Internacia Renkonto (kursoj, distraĵoj).

Julio (2/16): Prelegoj kaj kursoj (16/22): Altnivela Semajno.

Aŭgusto (23/7-13/8): Someraj Kursoj. (13/30): Lernado, praktiko, turismo.

Jam rezervu ĉambrojn. Skribu al: Esperanto-Domo, Gresillon, F-49150 BAUGE

Esperanto tra la Mondo

LA UNIVERSALA KONGRESO EN PEKINO-

La 71-a U.K. okazis en Pekino, inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto. Dumil eksterlandanoj ĉeestis. Kompletaj raportoj pri tiu kongreso mankas sed aperos en la venonta informa paĝo. Tamen, partoprenantoj substrekis la ne bonan organizadon kaj la faktō, ke nur 300 "selektitaj" Cinoj povis partopreni.

ESTONTAJ KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ-

La jubilara universala kongreso okazos en Varsovio de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987. Ankaŭ en Pollando okazos la kongresoj de la junularo (TEJO), de la fervojistoj (IFEF), de la instruistoj (ILEI), de la medicinistoj (UMEA), de la blinduloj (LIBE), de la pacmovado (MEM) kaj de la Freinet-pedagogoj. La sekvantaj U.K. okazos: en Roterdamo (1988), en Brighton (1989) kaj se eble en Afriko en 1990.

20-a Internacia Seminario, organizata de la germanaj asocioj okazos de la 27-12-86 ĝis la 3-1-87. Informas: Thomas Pusch, Am Schwertberge 23, D-2845 Damme.

4-a Festivalo Kanzon-teatra en Parizo la 29/30-11-86, en salono AMORC, 199bis rue St Martin 75003-Paris. Kontakti: UFE, 4bis rue de la Cerisaie, 75004-Paris.

Franca Kongreso de Esperanto 1987, 5-9 de junio en libertempa centro "La Gaillarde", ĉe la Lazura Marbordo. Adreso: Esperanto, Tour Vadon A, F-83700 Saint Raphaël.

FONDO DE INTERNACIA SCIENC-AKADEMIQ

Dum aprilo fondiĝis en Kopenhago Internacia Scienca Akademio "Comenius". Laŭ la statuto 60% el ĝia membraro devos esti membroj de iu nacia scienca akademio. La celo estas prosperigi esperanton per praktika uzado de la lingvo en la sciencoj.

ESPERANTO-GRUPO EN LA EUROPA PARLAMENTO

Eŭropa Esperanto-Centro (Schotlandstr. 73, B-1060 Bruselo) informas, ke la Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo havas 58 membrojn el 8 landoj.

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

PROMOCIAS LA CSEH-INSTRUADON-

Internacia Esperanto-Instituto, kies sidejo situas en Hago (Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando), disvolvas agadon por promocii kaj profesiigi la instruadon de esperanto laŭ la fama Cseh-metodo. La "kurso de Andreo Cseh" estas nuntempe reviziita kaj modernigita. Krome, IEI ofertas tri-ŝtupan serion da seminarioj por doni diplomon al vere altnivelaj profesoroj de la internacia lingvo.

UEA EN RENOVIGITA DOMO-

Oni inaŭguris en Roterdamo (Nieuwe Binnenweg 176), la vastigitan kaj renovigitan domon de Universala Esperanto-Asocio, kun, interalie, moderna ĉambro por la libroservo.

EN FRANCA FERVOJA INFORMILO-

La faldfolio de la franca fervojkompanio pri "Inter-Rail", vojaĝkarto por la gejunuloj, entenas paragrafon pri la esperanta Pasporta Servo, kun adreso de Junulara Franca Esperanta Organizo. La junaj francaj esperantistoj povas ricevi tiun informilon en la francaj stacidomoj.

POR RICEVI ADRESOJN DE KORESPONDANTOJ-

Se vi, aŭ viaj gelernantoj deziras korespondi kun eksterlandaj amikoj, turnu vin al "Koresponda Servo Mondskala", "Les Hortensias" 2, 121bis boul. Napoleon III, F-06200 Nice.

Indiku la necesajn informojn pri vi mem, viajn dezirojn kaj aldonu, se vi volas ricevi adreson, du internaciajn kuponojn aŭ sep francajn frankojn al la poŝtĝirkonto: R. Llorens, Marseille 7.829.40 L.

ATENTU !

La abonprezo de KULTURAJ KAJEROJ altiĝos por la jaro 1987. La nova prezo estos: 65 frankoj. Sed kiuj el vi pagos antaŭ la 1-a de Novembro, tiuj rajtos pagi nur 60 frankojn.

La stranga Muzeo

En la sudo de la departemento Mayenne, en Francio, urbeto tute kvieta, Cossé-le-Vivien (Kose le Vivjen) kuŝas. Tamen, indika panelo mirigas la traveturanton: "La stranga muzeo de Robert TATIN: 2 km." La vojo montrita tuj eniras la kamparon. Baldaŭ, apud farmdomo, la ŝoforo povas haltigi sian aŭton sur speciala parkejo. La vizitanto devas nepre trairi farmkonstruaĵaron por trovi la aleon kondukantan al la "stranga muzeo". Kaj tuj oni sin trovas meze de strangajoj. Ne arboj staras ambaŭ-flanke de tiu aleo sed koloritaj statuoj el cemento, realistaj sed ankaŭ simbolaj, harmoniaj kaj groteskaj, kutimaj sed tamen strangaj. Kiu estis tiu artisto, kial lia arto estas tia?

Robert TATIN naskiĝis en Laval, ĉefurbo de la departemento Mayenne. Liaj gepatroj estis foiristoj kaj la juna Robert vivis en la medio de cirk-popolo, logparolantoj, karusel-ĉevaloj. Li multe admiris la cirkistojn kiuj surmetis belajn vestojn, blankajn gantojn por aperi sur la areno, kiel duon-dioj, post horoj da farbado aŭ riparado de la materialo. Por la infano blankaj gantoj signifas "faritan laboron". Kiam naskiĝis Robert ĵus mortis frato lia, bela infano. Robert ne estis bela kaj la patrino provis plibeligi lin per punta kapvesto. La aliaj infanoj mokis lin kaj li trovis rifuĝejon en la grupo de la knabinoj, kun kies pupoj li ludis. Oni nomis lin "la pupulo". Li vivis kun la gepatroj, dum la senfoiraj periodoj, en kvartalo duondezerta, apud kalko-fornoj, kie nokte li tiel timis la "houbille" (hubij), la fantomon, ke li okaze trovis rifuĝlokon apud la hundo, en ties dometo.

Allotis Robert kaj kvazaŭ ensorcis lin, la lumoj de la festoplaco, same kiel la mallumo de la kalkominejo. Rigardante ĉirkaŭ si en la cirk-areno, li vidis vizaĝojn parte prilumitajn, parte en la mallumo. Rajdante karusel-ĉevalon li atente rigardis la sinsekvon de lumaj

kaj mallumaj makuloj. Samtempe ŝajnis al li, ke ne li, sed la spektantoj rondiras., unua kontakto kun la relativeco de la movoj kaj la unueco de la kontraŭoj. Sur la bordo de la rivero li rimarkis, ke la akvo alportas fajnan sablon al la fajna sablo, gruzon al la gruzo; kvazaŭa speguliĝo de la vivo: riĉuloj iras al riĉuloj, malriĉuloj al malriĉuloj. Tamen ŝajnis al li, ke entute devas ekzisti unueco de tiu diverseco, iu monduoneco.

Robert iom lernis el libroj (li multe ŝatis "La kreado de la mondo antaŭ la homapero" de C. Flammarion), sed li ĉefe lernis el la praktiko mem. Unue li laboris ĉe farbisto plej ofte farante mastikon kaj pistante kaj miksante kolorigilojn. Li rimarkis, ke, post longa pistado de verda kolorigilo, li vidis sur la blanka muro ruĝajn makulojn: problemo de la komplementaj koloroj. En Parizo, kie li restadis kelkajn jarojn post sia dekseca jaraĝo, li lernis kaj praktikis ornamadon, desegnadon, ceramikon. Danka'al siaj konoj, kiam li militservis, li ornamis la soldat-hejmon kaj rekompence ricevis eblecon lerni optikon, priskriban geometrion kaj perspektivon. Li samepoke interesiĝis pri la simboloj, kiuj jam ekzistis en la plej fora antikva periodo:

la lampo esprimas la homan inteligentecon;

la cirklo esprimas la movadon, la nedifineblon;

la kvadrato esprimas la senmovadon, la difineblon;

la krescento esprimas la nekonstantecon....

Ankaŭ dank'al vojaĝoj Robert TATIN lernis. Li studis la naturon en Svislando, Korsikio, Sardinio. Li vizitis la muzeojn de Italio kaj Sicilio. En 1938 li iris al Novjorko sed revenis post kelkaj monatoj pro la Dua Mondmilito. Dum la german-ĉeesto en Francio, li laboris, kiel helpanto de terkulturisto apud Albi, en kies muzeo troviĝas tre bela kolekto de la pentraĵoj de Toulouse-Lautrec. Post partopreno en la liberigo de Parizo, li fariĝis tie karbo-vendisto samtempe farante ceramikaĵojn. Tiam li amikiĝis kun la pentristo Dubuffet kaj renkontis la skulptiston Giacometti kaj la verkistojn Jean Cocteau, André

Breton kaj Jacques Prévert.


Robert TATIN sopiris ankaŭ pri alia arto, tiu de Sud Ameriko. Li foriris al Brazilo. Post mizera vivotempo kelkmonata li renkontis mecenaton, kiu venigis por li ceramik-fornon. Ek de tiu momento li diris, ke "la aĵo naskiĝas, kreskas kaj akiras personecon." Liaj kreaĵoj bone vendiĝis kaj li estis premiita, ankaŭ pri skulptado, en 1951 okaze de la Festivalo en Sao Paŭlo. Li sentis sin preskaŭ riĉa kaj ekiris suden kun tri gelernantoj liaj, por longa studvojaĝo. Post kvinjara foresto Robert TATIN revenis Francion. Pro diversaj malbonaĵoj li restis nelonge sur la Lazura Marbordo kaj iris al Parizo, tute senmona. Li serĉis kaj trovis "varmecon" en la malriĉaj kvartaloj. Li ellernis litografion kaj tiam renkontis Elizabetan al kiu li edziĝis. Li nomis ŝin Liseron (konvolvulo). Li aĉetis malbonstatan domon apud Cossé-le-Vivien, en loko nomita La Fresnouse (la fraksenejo). Ili ambaŭ riparitis tiun domon. La ĝardeno fariĝis konstruejo. Laŭ la planoj de Robert ili ambaŭ fosis, ŝovelis, pioĉis, uzis trulon. Iom post iom altiĝis "Notre Dame de Tout le Monde" (Nia Sinjorino Tutmonda), renkontloko de tero kaj ĉielo. Tie oni trovas la unuecon de la kontraŭoj: la Yin kaj la Yang, Blanko kaj Nigro, Fajro kaj Akvo, Cielo kaj Tero, Suno kaj Luno, sur

kelkdekoj da kvadratmetroj, kaj "trans la videblo" la "kaŝitan energion kuŝantan en ĉiu aĵo". Robert TATIN diris: "Ni povas arton fari nur sensante kaj transŝanĝante la nepriskribeblian energion, kiu sin kaŝas sub iu ajn ordinara aĵo".

Ne ĉiam facila estas la komprenado de la kreaĵoj de Robert TATIN. Estas necese klopodi, iri la vojon, kiun li mem iris, laŭ la diversaj etapoj, kiuj estis la esencaj fontoj de lia inspiro kaj de lia verkado. Oni estas invadita de tiu arto. Parolante pri memregado li skribis: "La animaleco, la instinkto ofte superas la homecon; granda penado necesas por mem senkateniĝi kaj iri sur la vojo al lucida homeco".

Konkludon ni povas trovi en teksto de Robert TATIN mem: "Tion mi perfekte konas, kion mi mem lernis. Estas necese akiri rigard-kapablon por akiri vid-kapablon, akiri diven-kapablon, rev-kapablon, imag-kapablon, est-kapablon".

Laŭ informoj parte eltiritaj el dokumentoj de "Bibliothèque de Travail" n°940.



ORFEO IRINTA INFERON

(2.a parto)

Pro reŭmatismo, kiu daŭre turmentis lin, Offenbach forvojaĝis al kuracloko Ems -Germanio-, kie li skribis la muzikon de "Orfeo irinte Inferon". Poste, sur la scenejo de la Varietea teatro en Parizo, ek de la unua prezentiĝo, la sukceso estis tiel granda, ke oni reludis ĝin 228 fojojn. Lia Moŝto, Napoleono la Tria, reveninte de milito en Italio, volis ankaŭ spekti la burleskaĵon, kiun oni reludis ceremonie por li en Aprilo 1860. Lia Moŝto bone amuziĝis; kiel konsekvenco Offenbach fariĝis franca civitano kun franca nomo Jacques. La regno volis apogi amuzulojn: oni ridu per dekreto!

Ne temas ĉi tie rakonti ĉiujn ridindaĵojn dismetitajn en tiu ĉi opereto. Se Orfeo, kiu ludas violonon ĉar li estas muzikprofesoro en Tebo, volas iri inferon, tion kaŭzas ne la ĉagreno sed la postulo de fikcia personaĵo inventita de la libristo: la publika opinio, kiu malkonsentas pro moralo, ke la Dio Plutono forrabis Eŭridicon...en la dua akto de la komedio, la Dioj dumnokte estas vestitaj per nokto-ĉemizoj...la dioj ribeliĝas kontraŭ Jupiteron... Jupitero kaj Plutono konkurencas por amindumi al Eŭridica...sed je la fino, kiel piroteknikaĵo en la agado leviĝas ĉi nun fama saltdanco "French Can Can" (frenŝ kankan), kiu rondiris la terglobon.

Plurfoje dum la sekvantaj jaroj "Orfeo" estis reenscenigita kaj en la jaro 1864 la kompatindaj grekaj Dioj estis denove pririditaj kun "La bela Helena", kie estas rakontita ankaŭ ŝerce sed iom pli ampasiece, la aventuro de rabado de Helena per la belviro Paariso, kolero de la edzo Menelaso kaj komenco de la Troja milito. Ne eblas traduki ekzakte la rekantaĵon konatan tiutempe de la tuta Parizanaro: "Jen la barbula reĝo, bula reĝo...jen Aga - Agamemnono" ...nek tiu de la "strangaj diinoj; kiuj tiel allogas la belknabojn!... Plej elstara opereto ankoraŭ aktuale ludata estis "La Vie Parisienne"

(La Pariza Vivo), satiro de la tiama monduma socio de la tria Imperio franca, eble ĉar en 1864 la cenzuro malvigliĝis, la politika vento blovis al libereco! Post la ruiniĝo de la Imperia regno kaj "Commune Revolucio" kruela de 1870, oni reludis Orfeon en februaro 1874, kiu atingis pli ol 1000 prezentadojn. Tiam Offenbach estis pli kaj pli malsana; liaj amikoj preskaŭ devigis lin forvojaĝi Usonon kun triumfa akcepto en Nov Jorko.....

Estas la loko citi parton de aŭtobiografio skribita de la muzikisto por gazetisto en 1864:

"Oni multe pardonos al mi, ĉar mi multe teatro-verkis. Mi estas franco de tri jaroj dank'al la Imperiestro, kiu komplezis honori min per leteroj de Grandnaturaligo; oni min nomis Kavaliro de Honorlegio. Mi parolos al vi nek pri miaj nombraj sukcesoj, nek pri kelkaj fiaskoj; neniam sukceso igis min fiera, nek fiasko min faligis... Mi ne parolos pri miaj kvalitoj aŭ pri miaj difektoj. Tamen mi havas nevenkeblan teruran malvirton: senĉesa laboro. Mi kompatas al tiuj, kiuj malŝatas mian muzikon, ĉar certe mi mortos kun melodio ĉe la pinto de mia plumo"...

Kion antaŭvidis Jacques Offenbach fariĝis realeco en 1880. De longe li estis revinta komponi grandan Operon kaj pensis pri la "Rakontoj de Hoffman" laŭ la romantika germana aŭtoro. Grave malsana, apenaŭ povante moviĝi, Offenbach tamen laboris. Jam en 1879 li aŭdigis artaŭ amika publiko de 300 personoj la ĉefajn ariojn de la verkita opero, kun entuziasmeo de la aŭdantaro en tiu koncerto kondukata de S-ro Carvalho, tiama direktoro de la Komedia Opero (Opera Comique). La vintro de 1880 estis terure malvarma; la tre malsana Offenbach ĵus finis la piano-partituron de sia opero kaj mortis, ne povinte ĉeesti la unuan prezenton de Opero hodiaŭ daŭre konsiderata, kiel lia ĉefverko.

René Watier

Valentin Haüy

2.a parto

Kelkajn mallongigojn tamen elpensis Haüy, sed ili ne tiom helpis kaj konsistigis pli balaston ol simpligon; sekve de kio skribado iĝis pli kaj pli kompostita laboro. tiaj konkludoj pravigas la entuziasmon de la kunuloj, kiam Louis Braille prezentis sian alfabeton kaj pruvis la netaŭgecon de la sistemo de Haüy instruata kaj uzata. Tamen sen Haüy, la unua ĉenero, la ideo de Braille ne ekbrilus. Kaj, neforgesinda gravaĵo: ne nur klerigadon Haüy celis, sed enlaborigon.

Sur la laborkampo, pri kio okupiĝas la Haüy lernantaro? Oni ŝpinas, tordas ŝnuretojn, teksas retojn, trikas, veftas rimenojn. Oni relief-kaj nigrepresas fakturojn, reklamilojn, invitilojn, anonckartojn. Nur distra estas la muziko. Kiel dirite, la porblindula amasedukado jam estas novaĵo, eĉ novigaĵo. Necesas forigi skeptikecon ĉe la publiko. Informado nepras. Tial oni pardonu la pioniron pro la multnombreco de la elmontraĵoj, kiuj ĉiam sammaniere disvolviĝas. Oni legigas la lernantojn. Oni petas de la unua, ke li kompostu sur presframo frazon, en kiun li tute intence enmetos erarojn; kaj tiujn erarojn tria lernanto devas malkovri kaj korekti; dume, kvara kalkulas; kvina estas petata rekoni la situon de landoj sur mapo. Samtempe la cetero de la grupo manlaboras kaj foje sin interrompas por kanti ĥore aŭ partopreni en orkestra ensembleto. Pro pudoro ĉiuj havas la okulojn maskitajn de viziero.

Tiele la 26-an de decembro 1786 okazis en Versailles, antaŭ la reĝo kaj kortego, prezentado de la 24 lernantoj de la Institucio de Blindaj Infanoj. Kaj dufoje semajne la sama spektaklo estis proponata al la vizitantoj en la lerneja sidejo mem. Kelkaj kritikis Haüy iom akre pro tio, eĉ lin kulpigis pro trompemo, sed tia publika ekzercado celis ne nur diskonigadon, sed akiron de necesaj subvencioj. La ĉekortega elmontrado enspezigis 11 000 pundojn kaj la monkolokto en preĝejo Sankta-Eŭstaĉo okaze de la unua komuniĝo de la blinduletoj, 1 548 pundojn.

Ekde la revolucia komenciĝo; oni sentas la mankon de subvencioj pro la nobelara elmigrado. Kvankam la lernantoj partoprenas en diservoj, preslaboras, ktp. ili ne sufiĉe enspezas. Samkiel la surdmutuloj, ili devas sin meti sub protektadon de la Nacio kaj la 28-an de septembro la ŝtato decidas plene prizorgi la porblindulajn establojn. Notindas, ke dum la Revolucio la blinduloj vigle partoprenas en la civilaj solenaĵoj okaze de la tiel-nomata "festo de la Superega Estulo". Suprenlevitaj sur rulscenejoj ili kunkantas kun la ĉefpastro de la Diina Racio... Spite tion Haüy frontas gravajn malfacilaĵojn: li petadas panon, viandon, brulmaterialon, litojn, littukojn en siaj korespondaĵoj; li petadas la salajron de la instruistoj kaj la promesitajn stipendiojn por la lernantaro. En tiu turmenta periodo li trafas malamikojn. Oni lin taksas fipatrioto kaj dufoje li estas malliberigita. Tamen, kiam li reakiras liberon, li pledas por toleremo, frateco kaj socia paco. En tia animstato nemirinde, ke li aniĝas en Teofilantropio, kiu sub la Direktorio celas anstataŭigi la Revelacion per laŭnatura religio. Sed post nelonge la doktrino fariĝas ridobjekto kaj la adeptoj subtaksataj, eĉ suspektataj. Tamen ni ne lin riproĉu: tutsincera idealisto estas li. Cetere lia partopreno en la politika vivo ebligas, ke lia fondaĵo transvivu plej terurajn jarojn. Sed jen katastrofo: oni kunigas la instituton de blindaj laboristoj kun la maljunulejo Quinze-Vingts. Tiel laboristoj kaj nekapabluloj estas miksitaj kaj preskaŭ fuŝiĝas la laboro de Haüy, kiu tiel fortike kredadas je valoro de instruado kaj enlaborigado. Oni ĉesigas lian administran taskon kaj li tiel dolore reagas, ke en 1802 li mem rezignas.

Tiam li estas 56-jara. Juna emerito, li povus sin vivteni kaj fineduki sian pli junan filon. Sed neokupiteco tute ne taŭgas por li. Li malfermas samtempe lernejon por nordaj kaj sudaj lingvoj kaj privatan instituton sub nomo "Muzeo de la Blinduloj", kie malmultaj lernantoj spertas la samajn vivmanierojn, edukadon kaj instruadon, kiel la antaŭuloj.

Malbona por Haüy montriĝas tiu vivperiodo; li ekmalsaniĝas (kaj ne plu reakiros kontentigan sanstaton), disreŝiĝas, ĉu pro personaj okazaĵoj, ĉu pro blindulaferoj. La nuraj plaĉaj tagoj estas la ĵaŭdoj, kiam li vizitas sian "bonan fraton" ĉe la Plantoĝardeno. Fuŝa kaj senrezulta veturo al Rusujo lin eĉ pli malgajigas. La 25-an de aŭgusto 1817 li revenas al Francio, maljuna, malsana kaj amara. Tamen la ekslernantojn ege ĝojigas lia reveno. li iras al la frato kaj tute apud lia hejmo li aranĝas por si "monaĥan ĉelon", kie li ĝuas iom da paco kaj familia kvieto. Sed kruelajn elrevigojn li suferas, ĉefe ĉar estas al li malpermesite viziti la de li fonditan lernejon - nun tamen malkunigita de la malsanulejo, sed situanta tute apud la Naturscienca Muzeo sub la nomo "Reĝa Instituto de Junaj Blinduloj".- Nur kelkajn monatojn antaŭ ol li mortos, estos al li eble viziti siajn "karajn gefilojn", post la morto de la estraĉo, kiu malamikiĝis al li.

La 22-an de aŭgusto 1821 oni okazigas solenaĵon liahonore. La junaj lernantoj konkuras pri fervorego kaj talento por festi sian unuan bonfaranton. Por lin laŭdi ili kantas himnon de Gossec (fama tiama komponisto) muzikigita. La himnparoloj estis verkitaĵoj jam de longe por la festo de Haüy, la 14-an de februaro, dum la jaro 1788. Li ploras pro emocio. Jen lia lasta konsolo, lia lasta vera ĝojo. Liaj fortoj malkreskas, li paralizigiĝas. La aŭkapablo kaj vidpovo difektiĝas ĉe homo, kiu tiom oferis por kompensi la vidmankon de blinduloj. Li mortas la 19-an de marto 1822. Honore al li la blindulfloro kantas kontrapunktan meson. Li kuŝas en tombejo Père-Lachaise, apud la frato, kiu lin postvivis nur kelkajn semajnojn. Tre verŝajne inter la florkantistoj, kiuj lin festis en 1821 ĉeestis Louis Braille, jam lerta muzikisto kvankam li lernis nur de 1819. Verŝajne ĉeestis ankaŭ Charles Barbier, la dua ĉenero inter Haüy kaj Braille. Tiu Barbier, kiu sentis la superecon por la fingroj de elstaranta punkto kompare kun elstaranta streko, bazo de la Haüy sistemo.

Sed kiu li estis ? Nicolas Charles Marie Barbier de la Serre, kiu tutsimple kaj demokrate kutimis subskribi: Charles Barbier. Pri li Braille asertis: " Al lia procedo ni ŝuldas la unuan ideon pri la nia". Barbier estis idealisto, samkiel Haüy; utopiisto sed solemulo. Naskite 22 jarojn post Haüy, li migris al Ameriko komence de la Revolucio kaj revenis al Francio sub la imperia periodo. Li ekŝatis la problemojn pri rapida kaj sekreta skribo. En 1808 li publikigas sian "tabelon pri rapidskribo" kaj unu jaron poste broŝuron sub titolo "Tranĉoskribo por anstataŭigi la plumon kaj fari samtempe plurajn kopiojn ne desegnante literojn". Kial lia interesiĝo ? Li estis artileria ekskapitano kaj ne unue laboris por la blinduloj, sed spertis la utilon por oficiro skribi depeŝon en mallumokaj ĝin perfingre deĉifri. Nur poste li adaptis la sistemon por la blinduloj. Li aranĝis la 36 sonojn de la franca laŭ ses kolonoj po 6 signoj. Post eksperimentado kun kelkaj blinduloj li estas akceptata en la Reĝa Instituto (1821) kaj tie prezentas sian laŭtabelan klasifikon de la sonoj kaj uzas punktojn por montri ties ĝustan lokon sur la tabelo. Ankaŭ de tiu tempo datumas la skribtabuleto, praa specimeno de tiu nuntage uzata. Jen citaĵo el la raporto de la Franca Akademio: "La skribo ordinara estas la arto paroli al la okuloj; tiu elpensita de S-ro Barbier estas la arto paroli al la palposenso." Sed necesos 30-jara lukto sine de la Reĝa Instituto por alprenigi la sistemon de Barbier kaj demonstri la superecon de punkto super glata streko. Finfine la pruvo estas farita: eble pli rapide blinduloj legas kaj skribas.

Sed tia skribo estas fonetika kaj ne ekzistas interpunkcio. Malgraŭ la entuziasmiĝo oni ekkonscias, ke 12 punktoj estas pli ol necesas: ili naskas 4096 kombinaĵojn, dum la 6-punkta brajla sistemo naskas nur 63, kio sufiĉas. Haüy daŭre celis kaj klopodis interrilatigi vidulojn kaj blindulojn. Pro tio, eĉ se li estus vivinta sufiĉe longe, ĉu li estus akceptinta la brajlan alfabeton, tiel malsaman ol tiu

de la viduloj ? Estas dubinde.

Haüy, Barbier, Braille: tri Francoj. Tri ĉeneroj. Ili sinsekve laboradis por liveri kulturilon al la blinduloj. Sed notindas, ke Haüy ankaŭ emfazis la enlaborigan flankon. Oni ne forgesu la tiamajn antaŭjuĝojn kaj lin ne taksu laŭ niaj nuntempaj kriterioj, ĉar favoras nin la malkovroj de psikologio, sociologio kaj diversaj teknikoj. Dank'al Haüy malfermiĝis lernejoj en pluraj eŭropaj urboj. Kaj antaŭ ĉio ni ne forgesu la koroplenan homestaĵon, kiu amis, amadis la blindulojn, en ilin enblovis memfidon, tiel necesan por sukcesi en la vivo. Konklude ni rememoru kelkajn trajtojn de Louis Braille, la tria ĉenero. Li naskiĝis en 1809 kaj mortis en

1852. Li eniris la Instituton en 1819 kaj jam en 1828 estis helpinstruisto. Kompetenta en ĉiuj fakoj, ĉu por manlaboro, ĉu por muziko, ĉu sur intelekta kampo; perfekta amiko; amegata de sia lernantaro en tempo, kiam estis kutimo skurĝi la infanojn. Li foje admonis, sed neniam batis. Konstante li provis kompreni kaj helpi. Tial plezure la lernantoj frekventis lian klasĉambbron kaj plenfidis al li. Tuberkulozo kaj elĉerpiĝo lin forprenis la 6-an de januaro 1852.

Kvankam resumaj, la ĉi supraj vivdetaloj estu modesta omaĝo, ĉefe al Valentin Haüy, sed ankaŭ al tiuj tri ĉeneroj konsistantaj la unujarcentan amoĉenon, al kiu la blindularo tiom ŝuldas.

S. BONIOL

LASTATEMPE

APERIS

"La Vualo de l'Tempo", dudek originalaj noveloj de J.H. Sullivan.

"Sciencaj komunikaĵoj". Ĉiu numero: 96 p. N° 8: tekniko; N°9: Ter-sciencoj; N° 10: Komunikado.

"Geologio Internacia", vol. 5: 17 studoj de diverslandaj fakuloj.

"Molekuloj"; traktas en populariga maniero problemojn de la kemio.

"Perkomputila tekstoprilaboro"; 21 studoj pri aspektoj de la aŭtomata tekstoprilaboro.

"Sferoj 4"; nova volumo de tiu antologio de sciencfikcio kaj fantasto. 11 rakontoj tradukitaj el aŭtoroj de 11 landoj.

"Kulturo kaj Internacia Lingvo" de William Auld. Originala verko de 119 paĝoj.

"La Alta Akvo", ankoraŭ nova romano de la nun bone konata esperanta verkisto Istvan Nemere.

"Verso kaj larmo, elektitaj poemoj"; tria originala poemaro de Eli Urbanova.

"Internacia lingva komuniko en la eklezio kaj nuntempa mondo"; traktaĵo de Georgo Korytkowski (tradukita el la pola lingvo).

LA

LIBRO - SERVO

de la ESPERANTO-DOMO GRESILLON proponas al ties membroj grandan nombron da lastatempe aŭ pli frue aperintaj libroj.

Petu la katalogon al:

J. VINCENT
BP 54, F-49150 BAUGE

niaj poetoj

Al Kasandra

Karin', ni vidu, ĉu la rozo,
montrinta en belega pozo
purpuran robon je l'maten'
ne perdis tiun ĉi vesperon
de l'purpurplisoj la fieron,
vizaĝan brilon de seren'.

Ve, disperdiĝis, ho karino,
surloke ĝia belfascino,
ve! ve! post eta jam temper'!
Naturo, vere vi avaras,
ĉar tiel brila flor' nur staras
de la maten' ĝis la vesper'.

Karino, se al mi vi fidas,
dum la junaĝo gaje ridas
en la plej verda freŝodec',
la vivon ĝuu do ĝisreste:
ĉar kiel tiun floron peste
vin senbriligos maljunec'.

Al Maria

Magio estas l'am'; se mi dum jaro restas
ĉe mia amatin' por klaĉo kaj deklam'
kaj por rakonti pri pasia mia am',
kiel mallonga tag' por mi la jaro estas.

Sed se triopas ni, min ĝeno tro molestas,
mi eksilentas tuj, la dirojn kaptas lam';
en plena babilad' la vortoj stumblas jam,
kaj mi kaj mia buŝ' skuiĝon manifestas.

Sed kiam solas mi ĉe mia amatin',
la buŝ' pro klaĉa ard' ne venas al la fin',
parolas ĝis la fund' pri mia amdeziro:

elpensas revojn mi, rakontojn, vortojn nur;
por resti ĉe l'karin' cent jarojn laŭ sopiro,
sufiĉas ne jarcent', ne eblas do forkur'.

DIFERENCAJ AMESPRIMOJ

Kanzoneto

La kanzoneton la aŭtoro dediĉas
al komponisto, kiu verkos por ĝi muzikon.

Dum la Kongreso Esperanta
unue mi renkontis vin.
Vi plaĉis al mi, ĝojridanta,
kaj mi invitis sole vin.
Ho, tango, tango ! bela tango !
Kun vi mi dancis, karulin'...
Ho, tango, tango ! ĉarma tango !
Neniam mi forgesos vin...

Vi, fenomen' Esperanto,
plej bona lingvo en la mond'!
donacis vi al suferanto
feliĉon en l'amika rond'.
Ho, tango, tango ! bela tango !
Ĉielokula karulin'...
Ho, tango, tango ! ĉarma tango !
Neniam mi forgesos vin...

Kongreso sekvas post kongres'
sed mi ne partoprenas jam,
mi rememoras kun kares'
pri mia juna pura am'...
Ho, tango, tango ! bela tango !
Vi kie estas, karulin' ?
Ho tango, tango ! ĉarma tango !
Neniam mi forgesos vin...

Aleksandr Logvin

Pierre de Ronsard
(trad. Guido Holz)

PAĈO DE LA GEKNABOJ

Tiam la ŝuoj ne ekzistis. Reĝoj kaj almozuloj iris tra la vojoj plenaj je rokoj kaj rubusarbetoj.

Reĝo kolerigita de tiuj konstantaj vundoj, ordonis al sia intendanto kovrigi per tapiŝoj ĉiujn vojojn, sur kiuj li decidis paŝi.

Provu taksu la turmentegojn de la malfeliĉa intendanto ! Des pli, ke la reĝo lasis al li nur kelkajn tagojn por imagi kontentigan solvon. Tro maltrankvila, eĉ perdinte la dormon, la intendanto decidis fidi la popolan imagon kaj anoncigis pere de la heroldo, ke la reĝo promesas mirindan rekompencan al tiu, kiu elfaros taŭgan tapiŝon por plezurigi Lian Reĝan Moŝton.

La morgaŭan tagon malfiera metiisto sin prezentis al la palaco kun malgranda paketo sub la brako. Li diris, ke li alportas la magian tapiŝeton, kaj petas sian rekompencan. Konvinkita, ke tia tapiŝo devas esti tre volumena, la intendanto ĵetigis eksteren la malfeliĉan metiiston, nomante lin "fia trompisto".

Tamen nia viro ne malkuraĝiĝis. Li revenis al la palaco kaj petis esti akceptata de la reĝo mem. La gardistoj lasis lin eniri. Konsentis lin renkonti la stranga monarko.

La malgrandeco de la paketo iomete skeptikigis la monarkon, sed ĉar li estis scivolema, li petis vidi la faman tapiŝon. Tiam nia brava metiisto rapide malfermis sian paketon kaj eltiris el ĝi du belajn pantoflojn, kiujn li tuj surŝovis sur la reĝajn piedojn.

"Sed...kie estas la tapiŝo?" demandis la reĝo. "Ĉu Via Reĝa Moŝto bonvolos paŝi tra via parko?" respondis la metiisto. Tre flatata vidi siajn piedojn tiel bele ornamitajn la reĝo jesis je tiu propono, kaj promenis tra la parko kune kun la metiisto.

"Via Reĝa Moŝto", tiam diris la metiisto, "ĉu vi ne sentas, ke vi paŝas sur tre komforta tapiŝo?". "Mi konfesas, ke mi neniam sentis miajn piedojn tiel senĝenaj", diris la reĝo. Kontentega pro tiu inventaĵo, la reĝo dankis la metiiston kaj reĝe rekompencigis lin.

Tiajn tapiŝojn, nomitajn "ŝuoj", ni ankoraŭ nun uzas por nia komforto kaj eleganteco... Kvankam kelkaj malice asertas, ke parolante pri ŝuoj, komforto kaj eleganteco ne ĉiam akordiĝas!...

el "Malnovaj Rakontoj"

Tradukita de Kristjan' Pasleg'



"La Praktiko"
Sept. 1958

— Jes, ankaŭ ŝi lernas Esperanton, ĉar ŝi volas rapide trovi edzon.

(D. Wranka)

FANTAZIAĴOJ

Tiujn ĉi tagojn ni enterigis la junetan edzinon de nia maljuna poŝtestro Dolĉapipro. Enmetinte la belulinon en la teron ni, konforme al la moroj de niaj avoj kaj patroj, venis en la poŝtofacejon por fari la funebran feston. Metinte la flanojn sur la tablon la maljuna vidvo amare ekploris kaj diris: " Kiaj ruĝaj flanoj! Tute similaj al la vangoj de la mortintino. Tute same belaj! Tute same!"

" Jes ", diris la festantoj. " Si efektive estis bela...Virino de la plej bona speco!"- " Jes, ĉiuj miris rigardante ŝin... Tamen, miaj sinjoroj, mi amis ŝin ne nur pro ŝia beleco, ne nur pro ŝia boneco. Tiuj ĉi du ecoj estas alnaskitaj al la virina naturo ĝenerale, kaj ofte renkontataj en nia mondo. Mi amis ŝin pro alia anima trajto; mi amis ŝin, la mortinton (ŝi eniru en la ĉielan regnon!) pro tio ke ŝi, malgraŭ sia viveco kaj facilanimeco restis fidela al sia edzo. Si estis fidela al mi, kvankam ŝi estis dudekjara knabino kaj mi baldaŭ estos sesdekjarulo! Si estis fidela al mi, al maljunulo."

La diakono, kunmanĝanta kun ni, eligis blekon kaj tuson por esprimi sian dubon. " Tion vi ne kredas ?" demandis la vidvo. "Mi ne diras tion", respondis la diakono embarase." Sed la junaj virinoj estas en niaj tagoj tiel...frandemaj kaj.. spicamaj!" - " Vi estas en dubo sed mi tuj konvinkos vin. Mi subtenis ŝian fidelecon per diversaj manieroj. Kiel tion diri? Per strategiaj artifaĵoj. Mia konduto, mia ruza karaktero sukcese faris, ke mia edzino nenimaniere povis perfidi min. Jes, mi praktikis ruzaĵojn, kiuj konservis mian edzecan honoron. Mi scias pri specialaj paroloj, kaj sufiĉas ilin diri, kaj finite! Mi povas dormi sur ambaŭ oreloj."

" Kiuj do estas tiuj paroloj ?"

" La plej simplaj! Mi trumpetis en la urbo malbonan famon. Tiun ĉi famon vi tre bone konas. Mi diris al ĉiuj: mia edzino Alena havas ligon kun nia poliestro Ivan Aleksejĉ Zaliŝvakci. Tiuj ĉi vortoj sufiĉis. Neniu arogantis ĉirkaŭflirti Alenan pro timo, ke la poliestro koleriĝos. Ciu, kiu renkontis ŝin, forkuris senprokraste por ke Zaliŝvakci ne suspektu lin. Ha, ha! Vi ja scias! Apenaŭ oni havus afereton kun tiu ĉi anateminda lipharulo, oni tuj malbenus sian vivon. Oni havus en unu tago kvin monpunojn pro nesalubra korto; apenaŭ li rimarkus vian katon sur la strato, vi tuj havus malfacilaĵon kun la polico pro viaj bestoj vagantaj sen observo kaj zorgo."

" Sekve, via edzino ne estis la amatino de Ivan Aleksejĉ ?" diris mi kun miro.

" Ne, tio estis mia ruzajo. Ha, ha! Kion vi diros nun? Ĉu mi ne lerte superruzis vin ?"

Tri minutojn ni silentis. Ni sidis kaj sentis ĉagrenon kaj honton pro tio ke ni estis tiel lerte trompitaĵoj de tiu ĉi dika ruĝnaza maljunulo.

" Nu, diablo! Ĉi ja reedziĝos!", murmuris la diakono.

LA RUZO (A. Ĉekov)

TRADUKITA DE A. KOFMAN

POR VIA

DISTRO

-NOVA PROBLEMO-

LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 57 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj helpe de la sekvantaj ŝlosilvortoj:

<small>ĉiuj 7 mo- vitoj en la sistemo ĉiuj 7 litroj</small>	S	<small>iam an- de Rusio</small>	S	<small>krustulo</small>	O	<small>apud la unagrupo</small>	O	<small>akvum- taro</small>	A	<small>aer- brada</small>	S		
	C		R	K	U	M	F	L	E	K	S	O	
<small>senar- fika</small>	N		A	I	V	A	<small>kvant- da sub- tanco (acumar)</small>	E	N	T	E	N	
	E		K	S	T	E	R	M	O	V	A	D	A
<small>la 21a</small>	R		O		R	O	<small>frukto</small>	B	E	R	O	<small>priser- cisto</small>	
	M		O	N	A	T	<small>elektre 3 ang- ta atomo</small>	I	O	N	O	<small>modifi</small>	P
<small>fizio kun barb- fadenoj</small>	N	<small>meti ma- tuletojn metal- folioj</small>	P	U	N	K	T	I	<small>sufikso</small>	A	R		
	S		I	L	U	R	O	<small>ident- sami</small>	E	G	A	L	O
<small>nomu</small>	G		A	D	<small>eshe tal- sata je</small>	V	A	L	O	R	I	S	
	P		O	D	E	T	A	L	E	<small>model- deklari akcep- tinda</small>	T	I	P
<small>la 22a</small>	S	<small>noda</small>	K	N	O	T	A	<small>prefikso</small>	G	E			
	F	<small>litruo: flank- gluto</small>	J	R	<small>fermenta trinkoj</small>	<small>amara severa</small>	<small>parto de i'figilo</small>	O	P	T	I	K	
	I	<small>lanaĵ- estro person- unu</small>	A	B	A	T	<small>prefikso</small>	R	E	<small>interpe</small>	T		
	L		E	K	S	I	K	O	L	O	G	I	O
<small>scienco material- de gazeto</small>	P		A	P	E	R	<small>konifer- arbar!</small>	A	B	I	A	R	
<small>movado</small>	E		S	P	E	R	A	N	T	I	S	M	O

27-4-42-6-5-10: vira nomo

12-11-16-1-44-3-9-29: nomo de monato

30-43-23-14-17-19-38: palestina rivero

21-22-37-35-36-45-46: rakontoj por infanoj

18-54-8-7-26-25-50: vira nomo

49-15-44-33-34-31-55: parto de la monato

32-13-2-4-44-20-54-9-10: distancmezuro

47-48-52-1-23-28-40-39-14-11: okcidenteŭropa lando

42-53-41-51-29: glacipluvo

24-5-7-17-57-38-56: homidoj

1...57: malnova ĉina proverbo

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Réunion du Conseil d'Administration-
du 29 juin 1986-

Le président ouvre la séance en souhaitant la bienvenue à G. Lagrange, nouvel élu. Sont présents: Mmes Cheverry et Vincent, Mrs Babin D., Babin P., Bénistant, Bodereau, Boyet H., Dairon, Lagrange et Métivier. Se sont excusés: Mme Micard, Mrs Boyet F., Chevalier, Le Magadure, Lloancy. M. Babin fait le point sur les stages d'été. Quarante quatre personnes sont passées pendant le stage du 15 au 29 juin. Cette époque s'étoffe de plus en plus. Il faudra aussi diriger l'information sur ce stage vers les milieux non espérantistes afin de meubler le cours de 1er niveau. Mme Mee a guidé le cours de débutants. Il y avait une proportion importante d'étrangers: 65%. Le premier stage de juillet s'annonce convenable, le second moyen, le stage "informatique" très déficitaire. Il nous faut nous interroger sur le manque d'intérêt manifesté cette année. A cette date il n'est pas possible de connaître le nombre de participants à la Rencontre Franco-allemande organisée par JEF0. Au nom de tout le Conseil le président remercie Henri Boyet qui a assuré la coordination des programmes et les contacts avec les responsables de cours et les conférenciers. Les cours seront dirigés par Mmes Gramont et Vincent, Mrs J. Decobert, J. Laporte, R. Lloancy et D. Moirand. Les conférenciers seront: Mmes Cheverry Childs-Mee, Eggers et Plazotta, Mrs Lagrange, Lloancy, Métivier, Röllinger et Rose.

Pour l'année 1987 un calendrier des stages est mis au point et sera diffusé dès le mois de septembre.

Les statistiques montrent que le nombre de personnes restant pendant un stage complet, c'est à dire trois semaines, va en diminuant. La plupart restent environ deux semaines. Les raisons en sont très diverses. Il faut tenir compte de ce fait dans l'établissement du calendrier. Sro Szerdahelyi propose d'établir le programme de stage de Pédagogie et d'en guider un. Il faudra chiffrer le prix de son voyage.

La compagnie d'Assurance avec laquelle la MCE est sous contrat n'a pas du tout donné satisfaction lors des sinistres de l'hiver dernier. M. Boyet a contacté la MAIF et les pourparlers reprendront après les stages d'été. La tempête et la neige ont occasionné des dégâts dont une partie a été réparée. Il reste encore à refaire des chéneaux pour un coût de près de 30 000 francs. L'installation électrique et la tapisserie d'une salle-à-manger ont été refaites. Des WC extérieurs pour les campeurs ont été installés. Dès maintenant est prévue la réfection des barrières de l'entrée et de la piscine. Les abeilles, disparues lors de l'hiver 84-85 ont reparu. La réorganisation du rucher sera entreprise. Dès cette année il y aura une récolte de miel. Une personne de Baugé assure, à temps partiel, les menus travaux d'entretien autour du château. Un forestier a effectué des travaux urgents d'élagage et d'abattage.

Il a été nécessaire de faire installer un réducteur de pression d'eau et un régulateur de température pour limiter certaines dépenses inutiles. M. Lagrange remarque que le stock de livres du Libro-Servo est insuffisant. Mme Vincent

répond que la somme immobilisée pour ce stock est déjà très importante et qu'il est impossible de prévoir quels seront les titres les plus demandés. M. Lagrange demande également si une personne ne pourrait pas être embauchée pour surveiller les enfants pendant que les parents assistent aux cours. L'aspect responsabilité et assurance va être étudié.

La réunion est close à 17 H.

Le secrétaire: G. Bairon

Komitat-kunveno- 29|6|86

La komitato bonvenigas Georges Lagrange, kiu fariĝis komitatano okaze de la antaŭa balotado.

La ĵus finiĝanta staĝo ricevis sukceson pli grandan ol pasintjare: 44 personoj ĉeestis el kiuj 65% da eksterlandanoj. Ni devos ankoraŭ pli propagandi por tiu staĝo. Dum la somero vizitos la kastelon kontentiga nombro da gesamideanoj sed la pli multo ĉeestos nur du semajnojn aŭ malpli. La staĝo pri Informadiko anonciĝas ne tre sukcesa. La prezidanto dankas H. Boyet, kiu efike laboris pri la organizado de la studperiodoj.

La Komitato preparas la kalendaron de la programo 1987. Vi trovos tiun kalendaron sur alia paĝo. P-ro Szerdahelyi proponis organizi seminarion pri Pedagogio en du partoj. Li mem gvidus unu el ili. La datoj ne estas fiksitaj. Ankaŭ la verŝajnajn elspezojn ni devas antaŭkalkuli.

Okaze de la damaĝoj kaŭzitaj de la neĝo kaj frostoj ni konstatis, ke la asekura kompanio tute ne faris sian laboron. S-ro Boyet kontaktis alian pli seriozan kompanion. De post la antaŭa kunveno ni ĉefe elspezis por la instalado de necesejoj por la kampadistoj, por la tuta refaro de la elektra instalaĵo kaj la ŝanĝo de la murpapero de unu el la manĝo-ĉambroj. Ni ankaŭ aĉetis novan tenis-tablon. Agrabla novaĵo: la abeloj rehejmenigis kaj denove ni rikoltos mielon. Parttempa dungito prizorgas la ĉirkaŭaĵon de la kastelo kaj alia la arbojn kaj la arbar-aleojn.

Pro la tro forta premo de la akvo komunuma kaj malŝparo de varma akvo ni instaligis premo-regulilon kaj varmo-regulilon.

Rimarkoj estas faritaj pri la manko de kelkaj titoloj en la listo de la Libro-Servo kaj pri la ebleco dungi vartantinon por liberigi la gepatrojn dum la kursoj. Pri la unua punkto la respondo estas, ke la sumo uzita por starigi stokon estas tre granda kaj oni neniam estas certa pri la mendotaj titoloj. Pri la dua punkto antaŭaj provoj ne sukcesis sed ni studos la respondecan aspekton.

SPECIALA FONDUSO-

Sur la parkejo la aŭtomobiloj suferas pro la sunvarmo. Ni intencas konstrui ŝirmejon por dek (aŭ iom pli) da aŭtoj. La kosto anonciĝas iom granda. Kiuj el vi, aŭto-posedantoj povas finance helpi nin? Sendu ĉekojn al: Maison Culturelle Esperantiste, poŝtkonto Nantes 148539 P

JEN PROPONO-

Ni vendas kompletan kolekton de la revuo " ESPERANTO " de la jaro 1955 ĝis la jaro 1980. Proponu aĉet-prezon.



**La tuta familio legas nian revuon
KULTURAJ KAJEROJ**
(listo de la perantoj sur la lasta kovril-paĝo)

NIA KONKURSO

En ĉiu el la kvar numeroj de la revuo en 1986 estas proponitaj diversaj enigmoj, ludoj kaj demandoj, kiuj konsistigas konkurson. La premioj, de 50ff. ĝis 1000ff., kies listo aperis en la numero 1986/1, estos distonitaj en marto 1987. Vi rajtas sendi la respondojn al ĉiu el la kvar serioj aparte aŭ sendi la tuton samtempe ĉe la fino, antaŭ la 15-a de februaro 1987. Ne gravas ĉu vi kapablas respondi ĉiujn demandojn. Tamen partoprenu ĉar verŝajne ne multaj konkursantoj rajtos ricevi la maksimumon da poentoj.



TRIA SERIO

1- Jen la titoloj de kvin konataj verkoj. Trovu la mankantajn vokalojn :

L KSTL D PRLNG

ZP SĜ

VGD SB PLMJ

L FRN

VL NVL

2- Respondu la jenajn demandojn (la respondoj troviĝas en tiu ĉi numero de la revuo) :

- Kiamaniere Robert TATIN ricevis informojn pri la relativeco de la movoj ?

- Kiu evento okazigis la Trojan militon ?

- Kial Charles Barbier interesiĝis pri « Tranĉoskribo » ?

- Kiun sian Operon Offenbach finverkis sed neniam vidis surscenigita ?

- Kial oni povas dubi ĉu V. Haüy estus akceptinta la brajlan alfabeton ?

3- En la suba teksto enŝoviĝis kvin eraroj. Trovu kaj korektu ilin :

- « Se tia lingvo estos disvastigita, ĝi permesus al ĉiu scienculo esti rekte informita pri la laboroj, kiuj, ĉiumomente, en la tuta mondo, progresigas sian fakon. Kaj principe, konsideranta, ke la homaro konsistas el unu sola speco, lerninte vidi en la rasaj kaj naciaj diferencoj nur bagatelan fakon, ĉu ni ne devas senhezite deziri, ke ĉiu Homo sapiens estos dotita de unu sama esprimilo ? »

Jean Rostand

4- Jen kvin asertoj. Kiuj estas veraj, kiuj estas mensogaj ?

- La nuna prezidanto de la Akademio estas prof. Gaston Waringhien.

- La signifo de TEJO estas : Tutmonda Esperantista Jura Organizo.

- SAT estis fondita dum la 14-a Universala Kongreso en Helsinki (1922).

- Poemoj de Heine tradukitaj en esperanton aperis jam en 1887.

- La Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno estis instalita en 1929.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).
- Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).
- Finnlando** : Librŝa Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk.).
- Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
- Hispanujo** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^e - D ALICANTE - (1 100 pes.).
- Israelo** : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
- Japanujo** : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).
- Norvegujo** : S-ino Louise Bøe Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).
- Pollando** : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
- Svedujo** : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgratan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (60 kr.).
- Svislando** : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempoj ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.